



# LA JUNA VIVO

OFICIALA MONATA ORGANO DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO“

Redakcio kaj Administracio: TJO-Centro, West-Graafthijk (NH), Nederlando

Ĝironumero 382363

Jarabono 3 guld. aŭ egalvaloro

## Diskutotemo por junuloj:

### MILIT-RIFUZADO.

Kio estas milit-rifuzado?

Ĉiu mense sana homo ja abomenas militon.

Hodiaŭ mi speciale celas la problemon de tiuj junuloj, kiuj en la landoj, kie la soldata servo estas deviga, rifuzas soldatiĝi, ĉar ili opinias, ke la soldatiĝo utilas nur al milito kaj ili nepre ne volas partopreni en tiu laŭleĝa murdo.

En pluraj landoj tiuj rifuzantoj de la militservo estas, ŝirmataj de specialaj leĝoj, kiuj ebligas al ili ekzemple plenumi civilan servon anstataŭ la malakceptatan militdejon.

En Belgujo ĝis nun ne ekzistas tia speciala leĝo, pro kio la milit-rifuzantoj estas jure konsiderataj kiel malobeantoj al la leĝo kaj laŭ tio kondamnataj. Tiuj junuloj, kiuj plej ofte estas „elstaruloj“, kutime firme konservas sian opinion, eĉ post kondamno kaj plenumo de la puno. Ili do fariĝas t.n. rekulpuloj, laŭleĝe rekondamnotaj. Tio kompreneble kondukas al malfacilaj situacioj.

Tia kazo alarmis la gazetaron kaj la publikon.

Simpatia junulo, Jean van Lierde, 25-jara desegnisto el la ĉarma Valon-Brabanta urbeto Wavre, jam trifoje rifuzis militservi. Pasintjare li plenumis 9-monatan punon en mallibereio. Post nova rifuzo soldatiĝi, li je la 3-a de oktobro estis kondamnata de la Milit-Konsilantaro de Brabanto je nova 6-monata karcera puno.

Eĉ la oficiroj, kiuj lin akuzis, admiris la kuraĝon de tiu junulo, kiu ĉiam ĝentile, sed firme, klarigas sian opinion.

Unu el la plej potencaj ĵurnaloj en Belgujo, „Le Soir“, antaŭ ne longe publikigis traŝan artikolon de s-ro Jean Rey, eksministro, membro de la Deputitaro, pri la neceso de jura statuto por la konsciencaj rifuzantoj. En tiu artikolo s-ro Jean Rey tre objektive analizas la argumentadon de la militrifuzanto kaj de lia kontraŭulo.

Mi pensis, ke tiu objektiva studo pri du kontraŭaj opinioj povus esti bazo por debato. Tial mi petis de s-ro Rey la permeson parte traduki lian artikolon. S-ro Rey plej afable bonvolis doni al mi la petitan tradukpermeson, pro kio mi hodiaŭ ĝojas proponi al vi la diskutotemon: „Ĉu por aŭ kontraŭ militrifuzado?”

Kio estas via propra opinio pri tiu problemo, kiu certe interesos ĉiujn junulojn? Ĉu vi subtenos la rifuzanton aŭ ĉu vi pravigos lian kontraŭulon?

„Militrifuzanto”, skribas s-ro Jean Rey, „parolas jene”:

„Laŭ kia principo vi volas, ke mi murdu mian homfraton? Mi volonte dediĉus al mia lando mian tempon, mian monon, mian laboron, se necese eĉ mian vivon, sed mi nepre ne volas esti murdisto.

Laŭleĝa murdo tamen estas murdo; mortigi homon ne estas defendi doktrinon, sed estas mortigi homon. Mia konscienco rifuzas akcepti tion. Kruelega estas via socio, kiu devigas la homojn agi tiel. Vi organizu ĝin pli bone. Pratempe nur tiu, kiu tion deziris, estis soldato. Estas Napoleono, kiu iniciatis la devigan militservon. Kia bela referenco por socio, kiu pretendas esti demokrata! Vi senĉese ripetas, ke via reĝimo elstaras pro sia zorgemo respekti la homan individuon. Ĉu vi respektas la individuon, kiam vi ĵetas la rifuzantojn en la malliberejojn kaj kondamnas la homojn pro tio, ke ili uzas la liberecon, kiun vi pretendas havigi al ili?”

„Sed al tio,” daŭrigas s-ro Rey, „kontraŭulo respondas”:

„Bele dirite! Sed se oni pravigos vin, kie estos la limo? Ne nur fakta limo inter fidinduloj kaj aliaj, t.e. tiuj, kiuj pretekstos belajn motivojn ..... nur por forsavi sin el malŝatata devo, sed principa limo inter la individua uzado de libereco kaj la socia devo. Se vi permesas al la militrifuzantoj ne plenumi sian soldatan devon, ĉu vi konsentos, ke iu ajn civitano malplenumos iun ajn leĝon, pretekste ke lia konscienco tion postulas? Kial aliflanke maldevigi kelkajn privilegiulojn preni sian parton en malagrablaj taskoj? Ĉu vi kredas, ke tiuj, kiuj akceptas la soldatan devon estas sang-soifantoj, kiujn la problemo de morto, kiun ili kaŭzas, neniam turmentas? Estas facile lasi por aliaj la malbelegajn taskojn! Dank’ al kio nia lando do liberigis, se ne estas dank’ al la klopodo de milionoj da homoj, kiuj akceptis militi por forpeli la okupantojn? La detruoj de la moderna milito estas pli kaj pli kruelegaj, sed ĉu tio estas motivo por lasi liberan vojon al ĉiaj atakaĵoj?”

Jen do la du tezoj. Nun, amiko, al vi la parolo .....

Michel Pylloy, Belgujo.

*(Atentu, amiko! Ni tre ŝatus kompili dokumentaron pri la problemo de militrifuzantoj kaj ĝia solvo en via lando. Bv. sendi al la jena adreso: Es-*

peranto, 18 rue de Franquennes, Ottignies (Brabant), Belgujo, ĉion interesan por tiu dokumentaro.

*Eventuale kelkaj el tiuj raportoj estos tradukataj nacilingven kaj utiligataj ĉe altaj instancoj, kiuj nun sin okupas en Belgujo pri la sorto de konsciencaj rifuzantoj.*

*Antaŭdankon al ĉiu, kiu bonvolos nin helpi. — Respondo garantiata al ĉiu.)*

## BUDAPEST, LA ĈEFURBO DE HUNGARUJO.

Eble kelkaj legantoj estis en Budapest okaze de la Tutmonda Junulara kaj Studenta Renkontiĝo. Tiam ili vidis, ke Budapest estas granda kaj bela. Sed ili ne vidis la diferencon inter la nova kaj la malnova urboj.

Budapest kuŝas sur la du bordoj de Danubo. La parto sur la maldekstra bordo estas Pest (legu: Peŝt), la parto sur la dekstra bordo estas Buda.

La historio de Budapest komenciĝas en la tempo de la keltoj. Ili fondis sian kolonion: Akink (kie nun estas Malnova Buda, en la norda parto de Buda). La romanoj nomis ĝin Aquincum (legu: Akvinkum).

La roman regadon sekvis la huna, longobarda, avara kaj slava regadoj. De ili devenas la nomoj Buda kaj Pest. Dum longa tempo Pest estis la pli grava loko.

En la jaro 1241-a la tataroj detruis ambaŭ urbojn. Poste reĝo Adalberto la IV-a konstruigis sur la Fortikaĵo-monton la unuan fortikaĵon. Ĉirkaŭ la fortikaĵo rapide konstruiĝis la urbo, kiu estis sendependa de Malnova-Buda.

Ofte la reĝoj pasigis ĝian tempon en la Buda-a fortikaĵo.

En la jaro 1541-a la turkoj ekregis la du urbojn. Ili restis tie dum 45 jaroj. Tiam Buda estis tre malbela. Ĝi estis malluma kaj havis multajn ruinojn. La loĝantaro de Pest konstante malpliigis. Ĝiaj industrio kaj komercado ĉesis.

Kiam en la jaro 1686-a la kristanoj ekregis la du urbojn, Pest rekonstruiĝis.

La loĝantaro fariĝis germana, la hungaraj homoj forlasis la du urbojn. Nur tre malrapide la loĝantaro ŝanĝiĝis, ĝis kiam Buda kaj Pest fariĝis hungaraj urboj.

Poste Pest evoluis plu. Post la grandega inundo en la jaro 1838-a konstruiĝis la Hungara Nacia Muzeo, la Ĉenponto, grandaj kazernoj kaj domoj.

Dum la revolucio en 1848-a Pest estis la ĉefurbo de Hungarujo. Post la Liberecbatalo oni unuigis la du urbojn. Poste aliĝis ankaŭ Malnova Buda.

En Budapest estas multaj, grandaj, belaj konstruaĵoj, ekzemple: La Hungara Nacia Muzeo, La Operdomo, la Reĝa Kastelo, kiu detruigis en la batalo, la Sankta Stefano-Baziliko, la Parlamentojo, la Hungara Nacia Banko, la Matiaso-Templo (antaŭe ĝi estis la Kronuma Templo) k.t.p. La centrejo de la Tutlanda Socia Asekura Asocio havas 18 etaĝojn.

Budapest havas multajn kuracbanejojn, ĉar estas multaj terapiaj fontoj.

Super Danubo nun estas unu fervoja kaj kvar trafikaj pontoj. Dum la milito la germanoj eksplodigis ĉiujn. Dum 5 jaroj ni rekonstruis la 5 pontojn kaj nun oni konstruas la sesan.

Budapest havas tri grandajn kaj kelkajn negravajn stacidomojn. Antaŭe ĝi havis 14 kvartalojn, sed antaŭ nelonge oni aligis la antaŭurbojn kaj nun ĝi havas 22 kvartalojn. Laŭ la lasta nombrado (1949-a) Budapeŝto havas 1.600.000 loĝantojn.

Sed la evoluo de Budapest ne finiĝis. Se la urbo evoluos kiel dum la lastaj kvin jaroj, Budapest baldaŭ estos unu el la plej belaj metropoloj de Eŭropo.

Karlo G. Lazar, Budapest, Hungarujo.

## World Student Federalists (Tutmondaj Studentaj Federalistoj).

W. S. F. estas la internacia junulara kaj studenta sekcio de World Movement for World Federal Government (Mondmovado por Mondfederacio). La sekcio estas fondita en Montreux en 1947-a, dum la unua internacia kongreso de WMWFG. Ĝi havas grupojn en dudeko da landoj.

La 5-a jarkongreso de WSF okazis en la Universitato de Kopenhago de la 19-a ĝis la 26-a de aŭgusto ĉi-jare. Ĝin partoprenis ĉ. 30 gestudentoj el 7 landoj. Jen mallonga raporto pri la rezolucioj kaj deklaraĵoj aprobitaj de la kongreso:

En „La bazaj Principoj” oni legas, ke la taskoj de WSF estas akiro de la tutmonda junularo por la ideo „unu mondo” kaj la unuigo de ĉiuj penoj por trafi tiun celon, farataj de la junularo.

WSF laboras el la sekvantaj vidpunktoj: Oni ne povas akiri kaj konservi pacon, se la nacioj ne fordonas parton de sia suvereneco al mondregistaro, kompetenta doni kaj plenumi mondleĝojn por káj ŝtatoj káj unuopaj personoj. Nur tia registaro povas efektive garanti la bazajn homrajtojn. La karakterizaĵoj de la homa kulturo kaj de la nacioj povas esti konservataj nur, se minacoj pri perforto de ekstere estas forigitaj fare de mondregistaro. La vivnivelon oni povas levi, se supernacia potenco kontrolas la materiajn rimedojn de kiu ajn nacio kaj forigas la nun ekzistantajn artefaritajn barojn, kiuj malpermesas la ekonomian unuecon de la mondo. La politika liberigo de subpremitaj popoloj devas okazi en la kadro de mondfederacio.

Kompreneble la kongreso komprenas, ke grandegaj malfacilaĵoj minacas la efektivigon de tiuj esperoj, sed oni povas alproksimigi la celojn laŭ diversaj vojoj: propagandi mondfederacion kaj mondĉivitanecon, kunlaborigi parlamentajn grupojn, krei apartajn federaciojn (ekz. Unuiĝintan Eŭropon), krei supernaciajn labororganojn por specialaj aferoj.

Oni devas forte subteni la Unuiĝintajn Naciojn, samtempe laborante por la federacia mondregistaro.

Fine oni sin okupas pri absolutaj ideoj kaj deklaras, ke estas kompreneble, ke registaro de iu absoluta ŝtato devas akcepti konsiderindajn limigojn en la potenco super siaj ĉivitanoj, por ke ĝi povu aliĝi al federacio; tiel ĝi ĉesos esti absoluta en la ekzakta senco de la vorto.

La oficiala lingvo de la kongreso estis la angla, sed kvankam la kongresanoj estis studentoj, ĝi ne sufiĉis; oni devis uzi ankaŭ la germanan kaj francan lingvojn. Tial unu el la danaj partoprenantoj proponis, ke oni akceptu rezolucion pri Esperanto. Ne multaj voĉdonis kontraŭ la rezolucio, sed

multaj tute ne voĉdonis; tamen oni interkonsentis pri la sekvanta rezolucio:  
„WSF rekomendas al ĉiuj organizaĵoj, kiuj laboras por paco kaj unuigita mondo, la lernadon kaj akcelon de Esperanto kaj ĝian uzadon en internaciaj rilatoj. Ni konsideras la internacian lingvon grava rimedo por kunlaboro, interkompreno kaj komuna sentado ambaŭflanke de la limoj, kiujn starigas nacioj, lingvoj, rasoj kaj religioj. Pro la sama kaŭzo ni aldonas la rekomendon, ke oni instruu la internacian lingvon en fundamentaj lernejoj de la mondo kaj esperas, ke neniu lando hezitas prepari la enkondukon de Esperanto.”

Interesatoj povas en Esperanto peti informojn ĉe: World Student Federalists, Keizersgracht 369, Amsterdam, Nederlando.

E. S., Danujo.

## Raporto pri la Junulara Fakkansido dum la 36-a U.K. en Munkeno.

La 10-an de aŭg. 1951-a okazis, en ĉambro 214 de la Munkena Universitato, kunveno de la Esperanto-junularo. La aranĝintoj estis T.J.O. kaj la junularsekcio de G.E.A. Ĉeestis 45 gejunuloj el Germanujo (ankaŭ el la orienta zono), Nederlando, Svedujo kaj Svislando. Michel Schmidt por T.J.O. malfermis la kunvenon, salutante la kunvenintojn ankaŭ nome de la LKK. Li transdonis la bondezirojn de d-ro Ziegler, prez. de GEA, kiu bedaŭrinde ne povis ĉeesti.

M. Schm. unue prezentis la problemon de la Esperanto-junularo en Germanujo: pro la disiĝo en pluraj direktoj ne povis okazi progreso. Estonte oni laboru pli celkonscie kaj kune, por sukcesi en la disvastigo de nia ideo inter la junularo.

En la posta, tre fruktodona diskuto Peach (München), Bormann (Bielefeld), f-ino v. Waldowski (Berlin) kaj aliaj diris siajn spertojn kaj opiniojn. La ĉeestantaro aprobis la proponon de M. Schm. antaŭenigi nian propagandon apud la aliaj junular-organizaĵoj.

Dua programpunkto estis la problemo de internacia Esperanto-junularo. Oni konstatis, ke krom la junularaj sekcioj de la naciaj Esperanto-societoj ekzistas „Tutmonda Junular-Organizo”. Firma kunlaboro necesas.

Pri la tria punkto, la problemo de internacia Esperanto-junulargazeto, M. Schm. informis, ke „La Juna Vivo” estos daŭrigata, sed sen la infana kaj instruista paĝoj. La nova gazeto estos farata nur de la junularo kaj espereble multaj gejunuloj kunlaboros, por ke la gazeto estu bona.

Fine oni traktis la punkton de internaciaj junular-renkontiĝoj. Tiuj okazis pasintjare en Konstanz, ĉi-jare en Haarlem kaj ĉe Schluchsee (nur 35 pp) kaj, tuj post la U.K., en Urfeld apud Kochel. Venontjare la TJO-kunveno okazos en Danlando. Menciindaj estas ankaŭ la Arkeologiaj Tendaroj en Danujo.

Sur la tagordo estis ankoraŭ la jarkunveno 1951 de la Junulara Sekcio de GEA. Sed laŭ la decido de la ĉeestantoj tiu estis prokrastata ĝis la kunveno en Urfeld apud Kochel.

Oni esprimis la deziron, ke simila faka kunveno de la junularo okazu ankaŭ dum la venontjara U.K.

Kun danko al la ĉeestantoj M. Schmidt fermis la kunsidon je la 18.40-a.

Verkita laŭ la protokolo.

## ORGANIZAJ INFORMOJ.

(Sekretariino: *Helmi Veldhuyzen, Hof v. Delftlaan 79, Delft, Ned.*.)

La Sekcio Torino de la Itala Esperantista Junularo aliĝis al T.J.O. Ni kore bonvenigas ĝin kaj esperas pri bona kunlaboro!

Nia kaŝisto, Geert de Vries, transloĝiĝis. Notu la novan adreson: Pav. A. B., Kamer 106, R.P.I. Bosdijk 771, Eindhoven.

Per poŝtkarto de la 30-a de septembro s-ro F. Scholz, 2-a prez. de la Regiona Ligo Baden, sciigas la eksigon de tiu ligo el T.J.O.

Al nia alvoko pri kongresfotografajoj ĝis nun respondis neniu! Ni kuraĝas duan fojon peti ĉies kunlaboron por sendi kelkajn bildojn al la sekretarioj, por ke ni kompilu filmstrion pri la Harlema Kunveno, kiun ni montrus dum la 8-a I.J.K.

Protokolo Haarlem. Reĝustigo: Anstataŭ „Kaj Pedersen proponis ne akcepti la budĝeton, ĉar laŭ li ĝi estas tro favora” legu: „..... ĉar li opiniis, ke decidoj pri aliaj proponoj de la kunsido povos influi la budĝeton”. Kaj Pedersen retiris sian kandidatigon de Michel Schmidt, ĉar montriĝis al li, ke tiu ne povas esti elektata pro siaj kondiĉoj. La sekretariino nome estas elektita por du jaroj (do ĝis I.J.K. 1952) kaj la kondiĉoj devigus ŝin forlasi sian funkcion.” — La sekretariino esprimas sian bedaŭron pro la supraj du eraroj en la protokolo.

La 8-a I.J.K. okazos de la 10-a ĝis la 17-a de aŭgusto 1952-a.

Germanoj bonvolu atenti, ke la poŝtkonto de Michel Schmidt (Grüngang 2, Konstanz) estas: München 33992. Kiu do ne jam pagis por la administra jaro 1/9 '51—1/9, 52, sendu al li 3,50 DM<sup>f</sup> (abonantoj de julio aldonu 0,30 DM).

Lastmomente ni ricevis artikolon pri Danujo. Ĝi aperos en la decembra n-ro.

C. Rossetti: Kredu min, Sinjorino! (originala) .....	5,40 guld.
P. Benneman: Miru, Pensu, Ridu! (originala) .....	5,40 „
Jaume Grau Casas: Kataluna Antologio, broŝurita .....	3,40 „
Kantaro „La Juna Vivo” .....	0,75 „
Kantaro „Ni Kantu” .....	1,00 „
M. Dekker: La Mondo ne havas atendejon (el la ned.) ...	2,50 „
R. C. Muschler: La Nekonatino .....	broŝ. 1,75, bind. 2,60 „
„Burĝonoj”, fotoj kun poemoj (el la finna) .....	8,65 „
Nenjo Rimanto-Brian Leslie: A.B.C.-Libro .....	0,50 „
A. de Silva: Vivo de Zola (el la portugala) .....	1,25 „
Diversaj aŭtoroj: Rusaj Noveloj .....	0,35 „
Poŝtkartoj .....	0,01 „
Insignoj (kun ŝraŭbeto) .....	0,75 „

Ĉi tiujn kaj aliajn esperantaĵojn liveras la T.J.O.-Libro-Servo: Hof v. Delftlaan 79, Delft, Ned. Ĝironumero 570720.

**Donacu librojn, okaze de la decembraj festoj!**

## POSTMARKRUBRIKO.

La Germana Federacia Poŝto eldonis la 23-an de oktobro 1951-a novan serion da poŝtmarkoj: „Por la Sociala Helpservo 1951-a”.

La serio konsistas el kvar valoroj; eldonkvanto 11,5 milionoj.

La enspezoj el la kromprezo estos donataj al la ĉefkomitato de la liberaj Socialaj Help-Organizoj.

La poŝtmarkoj montras jenajn bildojn: 4 plus 2 fenigoj (la unua cifero montras la afranko-valoron, la dua estas la kromprezo), bruna, Vincenz von Paŭl (1576-1660), fondinto de katolikaj ordenoj de la Lazaristoj kaj Ordenaj Flegistinoj. — 10 plus 3 fenigoj, verda, Friedrich von Bodelschwingh (1831-1910), protestanta teologo, fondinto de la plej granda helpservo de la germana Interna Misio en Bethel. — 20 plus 5 f., ruĝa, Elsa Brandström (1888—1948), laboris kiel delegitino de la Sveda Ruĝa Kruco dum la jaroj 1914 ĝis 1920 kun granda oferemo por la bono de la germanaj militkaptitoj en Siberio, Moskva kaj Petersburgo. (Pro tio ŝi ricevis la kromnomon „La anĝelo de Siberio”). Poste ŝi daŭrigis sian bonfaran laboron en Germanujo. — 30 plus 10 f., blua, Heinrich Pestalozzi (1746—1827), socialreformisto kaj pedagogo.

Günter F. A. Milanowski (Germ.).

## RICEVITAJ ESPERANTAĴOJ.

**Köln**, kvarpaĝa esperantlingva broŝuro pri la tre malnova urbo apud Rejno, pri ĝiaj historio, nuna stato kaj eĉ pri ĝiaj rilatoj al la esperantomovado. Oni povas senpage ricevi la broŝuron de Verkehrsamt der Stadt Köln, Germanujo.

**Bonn**, faldprospekto kun urboplano kaj multaj informoj pri la urbo de Beethoven. La teksto estas germanlingva kun esperanto-traduko. La broŝuro estas senpage havebla ĉe Städtisches Verkehrsamt Bonn, Poststrasse 27/29, Germanujo.

**12-a Hispana Kongreso de Esperanto**, Tarrasa, Barcelona, 28-29-30 julio 1951. Granda, trikolore presita afiŝo.

**Prinsessenkalender 1952**”, grandformata monata kalendaro kun 13 belaj fotografaĵoj de la ned. reĝinidinoj. Ĝin eldonis „Pro Juventute”, kies celo estas ŝirmi kaj helpi minacatajn infanojn. Ĉiu, kiu povas subteni tiun noblan celon mendu ekzempleron de la kalendaro ĉe Kalenderactie „Pro Juventute”, Willem de Zwijgerlaan 26B, den Haag, ĝirkonto 517400. Prezo 2,75 guld.

**Esperanto-leerboekje voor de lagere school en voor hen, die geen ander dan lager onderwijs hebben genoten, 1-a parto**, de H. A. Appel, instruisto, Bergen op Zoom. Prezo 1,50. — La libreto estas destinita precipe por la 5-a klaso de la elementa lernejo. En 40 lecionoj la verkinto pritraktas en tre simpla maniero grandan parton de la gramatiko. Certe la malrapida pritrakto de la gramatikaĵoj havas multajn avantaĝojn. Sed malavantaĝo laŭ ni estas, ke nur en la 18-a leciono estas pritraktata la demanda vorteto ĉu, kaj eĉ poste la demandaj vortoj kie, kiu, ktp. Tiel oni malhavas la

okazon jam post kelkaj lecionoj paroligi la infanojn, responde al simplaj demandoj. Per tia „konversacio” oni ja plivigligas la instruadon. Ŝajnas al ni, ke nun la metodo, malgraŭ multaj bonaj ecoj, estas iom „teda”. Eble estus konsilinde uzi flanke de la lernolibro tre simplan libreton kun rakontetoj, ludoj, kantoj, ktp.

## Internacia Ski-renkontiĝo en Germanujo.

La Esperanto-junularo Baden invitas al internacia ski-renkontiĝo de la 26-a de dec. 1951-a ĝis la 2-a de jan. '52-a en Titisee (Nigra Arbaro) apud Feldberg (1500 m.). Partopreno por ne-germanoj senkosta. Ekde la germana limo la partoprenantoj ĝuos 50 %-an fervojan rabaton. Povos partopreni nur perfektaj samideanoj malpli ol 30-jaraj.

Petu detalan programon de: Esperanto-Jugend Baden, Konstanz, Grüngang 2, Germanujo.

**GRAVA:** Por faciligi la diskonadon de l' esperantista movado en Mezameriko, la esperantistoj de Gvatemalo aranĝos en marto 1952-a internacian ekspozicion de infandesegnaĵoj sub la patronado de la Departemento de Belartoj de la Registaro.

Ĉiuj gesamideanoj estas petataj helpi, sendante dekon da desegnaĵoj sub la temo: „Kiel la infanoj vidas sian regionon?”

Sur ĉiu desegnaĵo oni indiku: nomon, adreson, aĝon, lernejon, lernejan jaron.

La sendaĵoj estos rekompencataj per gvatemalaj infandesegnaĵoj, poŝtmarkoj aŭ kafo, laŭdezire.

Adreso: Exposición de Dibujos, Departemento de Bellas Artes, Callejón Manchen, Gvatemala-Cd., America Central.

# KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

**Germanujo:** Esp. Klubo en Konstanz aranĝos letervesperon je 12/12 '51. Bonvolu skribi multnombro al Esp. Klubo, Konstanz, Wollmatingerstr. 61.

Dieter Moosleitner, 13b Freilassing, Schliessf. 43, kor. kun skoltoj de ĉiuj landoj per poŝtk. kaj leteroj.

**Japanujo:** 15-18-j. lernantoj dez. kor. kun geamikoj en la tuta mondo. Keika Kôkô, 34 Haramaĉi, Bunkjo-ku, Tokio.

16-20-j. junuloj serĉas gekorespondantojn. Skribu al P. O. Box 19, Shinjuku, Tokio.

**Geedziĝis:** Rie Leegwater (W. Graftdijk) kaj K. W. de Geus. Ili nuna adreso estas: Paternosterstr. 14, Alkmaar, Ned.